

Unu el la Sep Mirindajoj de Brazilja, Brazilo.
TEMPLO DA BOA VONTADE
TEMPLO DE BONA VOLO
La plej vizitata monumento de la brazila ĉefurbo
LBV



João Preda



PAIVA NETTO

Ĵurnalisto, radikronikisto kaj verkisto. Li estas Direktoro-Prezidanto de Legio de Bona Volo.

"La Templo de Bona Volo plenumas historian taskon en la mondo: solidare ŝirmi en sia sino la ŝafojn de Dio, kiuj estas lacegaj pro apartiĝemo, soifegaj je la starigo de la Senlima Ekumenismo kaj la Tuta Ekumenismo sur la Tero. Ĝi estas renoviĝo de la spirito religia, filozofia, politika, scienca, ekonomia, arta eĉ sporta en la mondo, vera spirita **Renoviĝo**. (...) Pli grave ol konstrui materian templon estas starigi la Templon de la Vivanta Dio en la homaj koroj. Tion faras LBV ekde siaj unuaj tempoj. Tamen estis necese aperi simbolo de homa-spirita interfratiĝo, kiu gvidos en la Tria Jarmilo la homojn al la vojo de Frateco. Pro tio, ĉi tie staras la Templo de Bona Volo".

## TEMPLO DE BONA VOLO ESTAS AKLAMITA UNU EL LA SEP MIRINDAĴOJ DE BRAZILJA.

Aklamita de la Popolo kiel unu el la Sep Mirindaĵoj de Braziljo/DF, Brazilo, la Templo de Bona Volo ekde sia inaŭguro en 21/10/1989, fare de Paiva Netto, jam akceptis pli ol 18 milionojn da pilgrimantoj kaj turistoj. Laŭ oficialaj datumoj de Ŝtata Sekretariejo pri Ekonomia kaj Turisma Disvolviĝado de la Federacia Distrikto (SDET), ĝi estas la monumento plej vizitata en la ĉefurbo de Brazilo. Apud ParlaMundi kaj sia administra sidejo, laTemplo de Paco kompletigas la Ekumenan Ensemblon de Legio de Bona Volo. Informoj: (55 61) 3245-1070 / www.tbv.com.br

André Fernandes



# TEMPLO DE BONA VOLO
## Oazo de Paco

La 21-an de Oktobro 1989, la ĵurnalisto, radikronikisto, verkisto, komponisto kaj poeto, José de Paiva Netto, Direktoro-Prezidanto de Legio de Bona Volo, inaŭguris en Brazilio, ĉefurbo de Brazilo, la Templon de Bona Volo (TBV) — ankaŭ konatan kiel Templo de Paco aŭ Piramido de Lumaj Spiritoj —, monumento de notinda beleco, kiu rapide fariĝis referenco pri ekumena pilgrimado. Ĝi pionire detaligas la idealon impulsi la senliman Ekumenismon, havante kiel plej altan celon ligi fratece Terajn kaj Ĉielajn Estaĵojn el ĉiuj etnioj, filozofioj, religiaj kredoj kaj politikoj, kaj ankaŭ ateistojn kaj materiistojn.



TBV estas la plej grava simbolo pri Universala Amo, pri laŭdado al Vivo kaj al Tuta Ekumenismo, kies pordoj neniam fermiĝis ekde kiam la Direktoro-Prezidanto de LBV malligis la inaŭguran rubandon, starante malfermata dum 24 horoj ĉiutage. Ne hazarde ĝi estas la plej serĉata loko en la brazila ĉefurbo. Ĝin viziti, ĉe la adreso Quadra 915 Sul, Lotes 75/76, pli kaj pli fariĝas neprokrastenda kompromiso por tiuj, kiuj venas al Brazilio.

Ĉio en la projketo de TBV havas sian ekzistan kialon, ligitan al la senlime ekumena propono en ĝi entenita. La konstruaĵo, kies aspektoj estis zorgeme analizitaj, fariĝis rekontiĝejo de la Supera Spiriteco, Klerigado, Arto, Ekologio kaj de Spirita kaj Scienca Medicino harmonie aranĝitaj por inspiri la plej noblajn sentojn. La mezuroj kaj proporcioj de la monumento estas ligitaj al numero de perfekteco 7, kaj ankaŭ al la numero 1. Temas pri piramido sepedra, kiu altas 21 metrojn kaj diametras 28 metrojn. Sur ĝia pinaklo troviĝas purkristala ŝtono.



**KRISTALA ŜTONO** – Ĉe la pinto de la piramido troviĝas la plej granda purkristala ŝtono en la mondo. La kristalo simbolas, en la Tuta Ekumenismo, la unuigan ĉeeston de Dio. Laŭ ekspertizistoj, ĝi purigas la etoson katalizante energion, kiuj alfluas sur tiujn, kiuj eniras la lokon.

**NAVO DE TBV** – Ĝia planko estis konstruita el granito, kun desegno en spiralo, tiel ke la vizitanto apenaŭ eniras la Navon, trapasas la malhelan vojon, kiu rondiras en livuma direkto, reprezentante la malfacilan iradon de la Homo, strebe al iu ekvlibrpunkto. En la centro de la piramido, ĝuste sub la kristalo, ronda plako el bronzo simbolas la eltrovon de Lumo kaj komenco de nova irado. Pri la hela vojo, dekstrumen, ĝi estas vojo iluminita de la moralaj kaj spiritaj valoroj akiritaj per la penemo propra al la Homa Estaĵo, finiĝanta ĉe la Trono kaj Altaro de Dio, de kiu oni ricevas benojn.





**TRONO KAJ ALTARO DE DIO** – Ĝi estas la reprezentaĵo artisma, kaj ankaŭ ekumena kaj de Amo, starigita ene de TBV. La kvar bazaj elementoj de Naturo — fajro, aero, tero kaj akvo — estas reprezentataj en la artverko por simboligi la Kreanton (aŭ Ĉiela Patro). Ĝi estas referencilo por la Fido de la homoj, kiuj vizitas la lokon, kiaj ajn estas iliaj kredoj. La artverko farita de la itala skulptisto Roberto Moriconi (1932-1993) estas lokita en la direkto oriento-okcidenton, simbolante la kuniĝon de la mistikismo de Oriento kun la pragmatismo de Okcidento. Laŭ sugesto de la skulptisto de la artaĵo, sur ĝi oni vidas la surskribon de frazo de la verkisto Paiva Netto: “Ĉiu tago estas taŭga tago por renovigi nian destinon”.



**NOBLA SALONO** – Havanta ampleksajn instalaĵojn, ĝi estis konstruita por ricevi vizitantojn el la tuta mondo. En ĝi oni vidas skulpitaĵoj de Faraono Ramseso la 2-a, en la enirejo de la Egipta Ĉambro.

**PANELO “LA EVOLUO DE LA HOMARO”** – Ĝi ankaŭ estas lokita ene de la Nobla Salono. Laŭ iniciato de la gvidanto de LBV, la bildoj montras, apud la artverko prezentanta Jesuon, diversajn eminentulojn, kiuj sin distingis en la Historio pro sia brila agado favore al Homaro, en ĉiuj fakoj de la homaj agadoj.

**EGIPTA ĈAMBRO** – Kun impresdona dekoracio laŭmodele de la antikva Egiptio kaj en tria dimensio, la Egipta Ĉambro havigas idealan etoson por reestigi la vitalajn fortojn de la Estulo, por la spirita renkontiĝo kun la Eterna Patro. Temas pri interdimensia portalo, kaj kiu ĝin eniras tiu sentas sin ene de astralo pli delikata kaj alta. La pentraĵoj kaj skulpitaĵoj estis faritaj de Marciel Oehlmeyer. Kiel diras la konstruinto de la Templo de Bona Volo: *“Se vi ne povas iri al Egiptio, TBV alportas Egiption al vi”*. Ĉe la enirejo de la Egipta Ĉambro, en antikva egipta lingvo, portugale, angle, itale, hispane, france, germane kaj japane, estas registrita tiu ĉi maksimo de Paiva Netto: *“La mortintoj ne mortas”*.





**MANDALO** – La karmemora plastika artistino, la germana Ula Hansell, heredigis al la Templo de Bona Volo majestan kristalpanelon kun intermeto enmarmore, en du planoj. Mandalo estas reprezentaĵo, sur sia antaŭo, de la simbolo de la Tuta Ekumenismo, proponata de LBV (cirklo, en kiu ĉiuj kampoj de homaj aktivecoj rekontiĝas en Dio, pasante tra Bona Volo) kaj, sur la dorso, de la strebo al la spirita leviĝo de la Homa Estaĵo, tio estas, lia flugo de la Tero al la Ĉielo.



**MEMORIGEJO ALZIRO ZARUR –** Temas pri spaco dediĉata al la memoro de la karmemora Fondinto de Legio de Bona Volo, Alziro Zarur (1914-1979), omaĝe al tiu, kiu la unuan fojon revis ian tute ekumenan Templon, kaj kies eterna Spirito esta pli viva ol iam, laboranta "por regenerado de la Homa Raso", laŭ tio, kion li mem registris en sia poemo *A Escolha Urgente* [La Urĝa Elekto]. La funda muro de la memorigejo estas dekoraciita per la belega pentraĵo "La Konkero", de la fama brazila pentristo Sátyro Marques, kiu montras la venkon de la Rajdanto de la blanka ĉevalo de Apokalipso de Jesuo (la Kristo mem) super ĉia homaj kaj spiritaj mizeroj.

**ARTGALERIO –** Havante 570 m², ĝi estas unu el la plej grandaj kulturaj centroj en Brazilio. Ĝia kolekto havas verkojn de famaj aŭtoroj, krom ekspozicioj kaj cirkulantaj elmontroj. La loko disponas ankaŭ atelieron por farado de artaĵoj. Ĝi estas spaco malfermita al la talento de plastikaj artistoj de Brazilo kaj de la mondo.





**SANKTA FONTO –** Ĝi estas loko tre valorigata de la pilgrimantoj pro la Fido, kiun ili havas pri la terapeŭtikpovo de ĝia akvo. Elvenante de arteza puto, tiu utilega likvaĵo fluas tra diversaj filtriloj, trapasas la Navon de TBV, kie ĝi ricevas energiojn de la kristala ŝtono, antaŭ spruĉi el la fonto. La 16-an de Februaro 1996, Paiva Netto inaŭguris tiuloke francan skulptaĵon el la 18-a jarcento, faritan el bronzo, kiu prezentas Jesuon, la Ekumena Kristo, benanta ĉiujn, kiuj tie ĉeestas. Ankaŭ apartenas al la estro de LBV tiu penso, kiu troviĝas surskribita en tiu loko: "Akvo estas Vivo, sen ĝi ia ajn vivoformo fariĝas neebla. Malpurigi ĝin estas krimo kontraŭ la homaro ".



**MEMORIGEJO JOSÉ DE PAIVA NETTO –** Plej nova loko de TBV, la Memorigejo estis inaŭgurita en la jaro 2006, kiam Paiva Netto kompletigis duonjarcenton da laborado en Legio de Bona Volo. Per la ekspozicio de la objektoj eblas rememori kelkajn decidajn faktojn pri la historio de LBV, kiu estas tute ligita al la individua klopodo de la homo dediĉata al la kaŭzo pri Bono. La kolekto montras fotojn de lia infanaĝo, junaĝo, de lia familianoj kaj de lia akademia vivo. Ankaŭ estas videblaj du malordinaraj japanaj maŝinoj AKAI, per kiuj estis surbendigitaj la historiaj predikadoj de la Fondinto de LBV, Alziro Zarur. Aliaj maloftaĵoj de la loko: elefanto eltranĉita el ligno kaj manfarita horloĝo el marmoro kaj orfolioj, devenintaj el la regâ urbo Jaipur (Rajasthan), donacoj de la Ĉefministro de Hindujo, Manmohan Singh; la budaj pastraj vestoj, donacitaj de la gemonaĥo Yvonete kaj D-ro Ricardo Mário Gonçalves; inter aliaj gravaj objektoj.

**MONDA PARLAMENTO DE LA EKUMENA FRATECO (PARLAMUNDI DE LBV) –** Inaŭgurita de Paiva Netto la 25-an de Decembro 1994 antaŭ pli ol 100 mil homoj, ĝi celas servi kiel Forumo senlime ekumena por definitiva interkompreniĝo de la teraj popoloj esplorante ĉiujn fundamentajn aferojn de la vivo, koncernantajn al socio, homo aŭ spirito.





**SEKTORO DE LERNANTOJ –** Situanta en ParlaMundi, ĝi havigas ne nur al studantoj, sed al la ĝenerala publiko, pere de alloga etoso, lokon por pripensado, studado kaj esplorado, kun aliro al interreto, biblioteko (enkomputiligita laŭ programo *Arches Lib*), videoteko kaj eta-komikso-teko. Tiu loko ĉiujare akceptas pli ol 120 mil studantojn.



# LA SUKCESO DE VIA EVENTO ESTAS ĈE PARLAMUNDI DE LBV







Konvena kaj taŭga loko por okazigi eventojn. Kun altnivela arkitekturo, la kunvenejo prezentas internacian kvaliton por malgranda, meza kaj granda okazaĵoj. Klimatizita konstruaĵo, 5 etaĝoj, aŭditorioj, nobla salono, ĉambroj por trejnokursoj kaj ekspozicioj, biblioteko, sektoro por studado kaj la plej modernaj aŭdvidaj rimedoj.

SGAS 915 — Lotes 75/76 — Brazilio/DF — Brasil [Brazilo]
Tel.: (55 61) 3245-1070 — Fakso: (55 61) 3345-0050
Retadreso: www.parlamundieventos.com.br — www.bonavolo.com
Konsultu nian tabelon de prezoj. Ni atendas vin!